Joseph Freiherr von Eichendorff,

# La rompiĝinta ringeto

*tradukita de Chr. Pfeufer*

En ombra valo turnas
muela rado sin.
Jen loĝis mia kara -
ŝi nun forlasis min.

Fidelon ŝi promesis,
ringeton donis ŝi:
Fidelon ŝi forgesis,
rompiĝis ring' de mi.

Migradi mi dezirus
for, kiel muzikant';
kaj kie ajn mi irus,
resonus mia kant'.

Mi volus bataladi,
rajdante tra l'kampar',
ĉe l'fajro dormkuŝadi
dum nokt' en la tendar'.

La rado plu rondiras;
revante aŭdas mi.
La morton mi sopiras,
kvieton donus ĝi.

*Traduko de la Germana poemo "In einem kühlen Grunde" de* Joseph Freiherr von Eichendorff *(∗1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de Chr. Pfeufer.*

*Arg-1035-2101 (2014-05-31 17:34:45)*

*Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro "Internacia Kantaro", eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt und Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio. La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Bennemann, sur la paĝo 22 kaj 23. Erare estas indikite tie, ke la poeziaĵon verkis Wilhelm Müller.*